

Geografia nomenklaturu, 12-a parto
Esperantigo sen principoj
Claude Gacond, 293-a radioprelego, 1969.05.11 & 24

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ni vin atentigis pri la graveco de la debato malfermita de Tibor Sekelj per la eldono de *Mondmapo* kaj de propono de geografia nomenklaturu.

A.- La normigo de la esperanta nomenklaturu respondas al bezonoj internaj al la esperanta movado. Ĉiu lernis la geografian nomenklaturon en sia nacia lingvo. Dum internaciaj kunvenoj oni tendencas uzi naciajn esprimojn, kio malfaciligas la interkomprenon.

Cl.- Ni ekzemple memoras pri interesa raporto, kiu rakontis la aventurojn de juna sviso dungita de la franca fremdula legio. La prelegisto, kies nacia lingvo estis la germana, priskribis sian restadon en la urbo *Tanger*. Nur post longa momento ni komprenis, ke temis pri la urbo **Tanĝero**, kiun franclingvanoj prononcas *tangĝe* kun akcento sur la lasta silabo **e**, dum la germanoj metas la akcenton sur la unua silabo **an**.

A.- Pli malpli sama ortografio. Du lingvoj. Du absolute diferencaj prononcoj. Jen ofte la situacio, kiu estas la nia.

Cl.- El tio provoj al unuforma geografia nomenklaturu. Por multaj esperantistoj la vojo al tiu nomenklaturu iras tra la esperantigo. La *Mondmapo* redaktita de Tibor Sekelj tipe reprezentas tiun tendencon. El ĝia deklaro, kiun ni jam legis, ni reliefigas tiun aserton : « *Ni klopodis [...], ke ĉiu nomo estu esperantigita, kaj ne laŭeble plej korekte transskribita el iu nacilingvo.* »

A.- Ni iom ekzameni, kion donas tiu esperantigo ?

Cl.- Ni nin metu en la haŭton de gelernantoj, kiuj uzus tiun Mondmapon kaj ties nomenklaturon por lerni la geografion de la mondo. Ili studas Nordamerikon. Aŭdu la rezulton :

A.- Otavo, Montrealo, Toronto, Vankuvro, Kebeko estas la ĉefaj urboj en Kanado. Vaŝintono, Novjorko, Ĉikago, Filadelfio, Losanĝelo, Detrojto, Baltimoro, Klevlando, Sanluiso, Bostono, Sanfrancisko, Pitburgo, Milvokio troviĝas en Usono...

Cl.- Se viaj oreloj kaj viaj okuloj povas toleri similajn kripligojn, vi estas adepto de la esperantigo. Sed vi ĉiam povas reveni al la nacilingvaj lernitaĵoj por ne ridindigi vin en neesperanta rondo. La infanoj, kiuj uzus esperanton por enkapigi tiun nomenklaturon, ne posedus tiun avantaĝon. Sed ili ne estas stultaj. Ili rimarkis, ke esperanto estas tre regula lingvo. Ĝi prenas la internaciajn radikojn, kaj gluas al ili la substantivan finiĝon **o**. Hejme ili parolas nacilingve. Tiam ili sentus la deziron reveni al la internaciaj formoj, ĉar la gepatroj kredus, ke ili mokas pri ili, kiam ili metas **o** ĉe la fino de ĉiu urb-nomo. Ĉu la patro ne diris, ke la ĝusta formo ne estas **Kebeko**, sed **Kebek**. Tiam ili alvenus al tiuj formoj :

A.- Otav, Montreal, Toront, Vankuvr, Kebek estas la ĉefaj urboj en Kanad. Vaŝinton, Novjork, Ĉikag, Filadelfi, Losanĝel, Detrojt, Baltimor, Klevland, Sanluis, Boston, Sanfrancisk, Pitsburg, Milvoki troviĝas en Uson.

Cl.- Ĉerpante el tiuj kelkaj urbradikoj ni malkovru la sekretojn de tiu esperantigo, kiu estas proponita al nia praktika uzo.

A.- Unue la geografiaj nomoj devas sin vesti laŭ la esperantaj kutimoj. Ili devas ricevi finan **o**.

Cl.- Se ili jam finiĝas per **o**, nu bone, ili jam estas duone esperantigitaj ; nur fonetikaj ŝanĝetoj finos la necesan transformon :

A.- Toronto, Ĉikago, Sanfrancisko apartenas al tiu kategorio de feliĉuloj.

Geografia nomenklature, 12-a parto
Esperantigo sen principoj
Claude Gacond, 293-a radioprelego, 1969.05.11 & 24

Cl.- Se ili nek finiĝas per **o**, nek per alia vokalo, ili donace ricevas la absolute necesan **o** kaj estas submetataj al la esperanta fonetiko.

A.- Montrealo, Vankuvro, Kebeko, Vaŝingtono, Novjorko, Baltimoro, Klevlando, Bostono, Pitsburgo troviĝas en tiuj ricevantoj de la esperanta marko.

Cl.- Aliaj urboj devas sin submeti al vera kirurgia interveno. Ili havas la honton posedi finan vokalon, kiu ne estas **o**. Ili devas ĝin perdi, profite al la tiom necesa marko de la substantivoj :

A.- Ottawa, Canada, Philadelphia estas submetataj al tiu operacio por iĝi Otavo, Kanado, Filadelfio.

Cl.- Nun sekvas la plej gravaj kirurgiaj intervenoj. La transformoj devas esti profundaj, simile al metamorfozoj ili naskas novan formon, kiu kelkfoje apenaŭ rememorigas la larvan etimologion :

A.- Los Angeles, Detroit, Saint-Louis, Milwaukee ne povas eniri esperantan mondmapon sen similaj transformoj por iĝi Losanĝelo, Detrojto, Sanluiso, Milvokio.

Cl.- Restas la radiko **uson**. La lernantoj lernos, ke ĝi estas konstruita el la inicialoj de la nomo **Unuiĝintaj Ŝtatoj de Nordameriko**, sed laŭ la malnova angla formo.

A.- Ni ne riproĉas al la lingvo esperanto la uzon de propraj formoj por kelkaj geografiaj nocioj. Ĉiu lingvo submetas la vortojn al iuj transformoj. *Philadelphia* iĝas en la franca *Philadelphie*. Sed tiuj transformoj kaŭzas minimumajn ŝanĝojn, kaj ili obeas al lingvaj leĝoj.

Cl.- Kontraŭe la ŝanĝoj, kiuj intervenas en la nomo de esperantigo obeas al neniam lingvaj reguloj. Formoj, kiuj estas universale konataj eliras la intervenojn de la esperantigistoj sub karnavalaj vestoj.

A.- Se esperantigo obeas al reguloj, forigante la finan **o**, ni troviĝus antaŭ radiko, kiu respektus la personecon de la geografia termino. Kontraŭe oni troviĝas antaŭ kripligoj kiel **Ĉikag, Otav kaj Losanĝel**.

Cl.- Malgraŭ la reguleco de sia gramatiko, kiu estas vokale signita, esperanto estas sufiĉe belsona lingvo absolute ne monotona. Kontraŭe la substantiva **o** kaj kelkfoje la adjektiva **a** estas la solaj vokaloj, kiuj rajtas troviĝi je la fino de geografiaj vortoj. Tio kondukas al enuo, dum kutime lego de geografia nomenklature ne donas tiun impreson.

A.- Unu el la kvalitoj de esperanto estas ties kapablo asimili en sian gramatikan sistemon plej neatenditajn vortojn. Bedaŭrinde en la geografia fako tiu asimilkapablo ne ekzistas. Por ĉiuj lingvoj, kaj ankaŭ esperanto, nomoj de urboj, riveroj, montoj, golfoj, maroj, valoj, marĉoj ne estas asimileblaj. Ili konservas la markon de sia lingva deveno.

Cl.- Kaj ĝuste, kiam oni rigardas mapon, oni divenas tiun devenon. Oni rimarkas la ŝanĝojn de la naciaj lingvoj laŭ iuj songrupiĝoj.

A.- Esperanto ne devas kaŝi al ni tiujn devenojn. Esperanta mondmapo devas respekti la personecon de la geografia nomenklature.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-